# EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado


## Enhavo


- La 7a Afrika Kongreso de UEA.
- Turkio invitas al la 13a Mezorienta Kunveno



Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2019-12 sendita el Budapeŝto la 6an de septembro


*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol mil ricevantoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## Alvoko por la 7a Afrika Kongreso en Burundo

La AFRIKA KOMISIONO DE UEA, kunlabore kun la Landa Asocio de Burundo (ANEB), invitas Esperantistojn loĝantajn en Afriko kaj tiujn el diversaj partoj de la mondo partopreni la 7-an Afrikan Kongreson de Esperanto kiu okazos en « Bujumbura » (Buĵumburo), la ĉefurbo de Burundo, inter la 21-a ĝis la 27-a de decembro 2019. Pasigu la jarfinajn Festojn kun Afrikanoj en la bela somera lando.

Tiu evento ebligas ne nur longajn kaj fruktodonajn laborkunsidojn inter Afrikanoj el diversaj landoj, sed aldone specialajn renkontiĝojn de Esperantistoj el la tuta mondo kun Afrikanoj. Krom la laborkunsidoj kaj diskutoj, multaj programeroj estas planitaj dum la Kongreso: prelegoj de elstaraj Afrikanoj kaj alikontinentanoj, AMO-Seminario pri eksteraj rilatoj, perfektiga lingvokurso por komencantoj kaj progresantoj, lernado de loka lingvo Svahilo, ekzamensesio de ILEI/UEA, sporto, loka turismo (ekskursoj) en belaj bestaj parkoj kaj pliaj vidindaĵoj, riĉaj-kulturaj-diversaj prezentaĵoj, ktp.



Jen la vico de la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto, kiu survojas al kunigo de ĉiuj Afrikaj Esperantistoj por verdigi konkrete la kontinenton. Plia invito iras al la amantoj de Afriko por elmontri sian solidaremon kaj sian samideanecon al Afrikanoj iel subtenante la eventon. La lando de "AMAHORO", kiu signifas 'Paco estu kun vi', atendas vin.

Emile Malanda, la kunordiganto de Afrika Komisiono de UEA (2017-2020)




*Emile Nianga MALANDA*
*Chairperson of Intercultural Centre of Living Languages*
*Coordinator of African Commission of UEA*
*Volunteer of UN*
*Skype: emile.malanda*
*Website: www.icll.co.za*


Aliĝilo estas alkroĉita.


## La dek tria Mezorienta Kunveno okazos en Turkio

La loko de la kunveno estas jam fiksita. Temas pri Cešme proksime de Izmir. La disanco de Istanbulo ĝis Izmir ne estas granda (ĉ. 270 km.) farebla per trajno, buso, pramo, aviadilo aŭ aŭto. La anoncitaj datoj estas de la 3a ĝis la 6a de aprilo.

Pliaj informoj ĉe

[https://uea.org/vikio/La_dek-tria_Mezorienta_Kunveno_en_Turkujo](https://uea.org/vikio/La_dek-tria_Mezorienta_Kunveno_en_Turkujo) .

La nova komisiono de UEA por MONA estas proponita kaj atendas estraran aprobon.




====================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <[https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/](https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/)>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: [http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado](http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado). La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de 2018. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolinguloj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.